



ATEISMO

Bulteno de Ateista Tutmonda
Esperanto-Organizo



"Eklezio kaj Ŝtato: Aferoj Apartaj" - manifestacio en Bonaero por sekularismo

Vorto de la Redaktoro

Lastatempe du kristanoj en la hinda subkontinento kaptis tutmondan atenton – unu estas pakistana katolikino Asia Norin (kutime konata kiel “Asia Bibi”), la alia usona protestanto John Chau. En 2010 Norin estis arestita kaj mort-kondamnita pro blasfemado kontraŭ islamo post kverelo kun islamanoj najbarinoj. Feliĉe en oktobro la supera kortumo de Pakistano senkulpigis ŝin pro manko de pruvoj kaj ordonis ŝian liberigon. Sed miloj da pakistananoj protestis, postulis ŝian mortigon, do ŝi kaj ŝia familio alfrontas grandan danĝeron kaj nun kaŝas sin sub registara protektado. Aliflanke, Chau estis mortigita en la Andamanaj Insuloj de Hindio pro religio, sed en aliaj cirkonstancoj. Li alvenis al izolita insuleto, kie loĝas tribo protektata de la registaro, kun la intenco konverti la tribanojn al kristanismo. Ili respondis per pafado de sagoj.

Ambaŭ kazoj diversmaniere lumigas problemojn ligitajn kun religio: netoleremo al aliaj religioj kaj kredoj; la manko de apartigo inter ŝtatoj kaj religioj; la ekstremaj agresemo kaj netoleremo, instigitaj de klerikoj, de parto de la islamanoj; la trudado de unu religio al popolo kun tute alia kredaro kaj kulturo; la forta emo de multaj kristanoj kaj islamanoj disvastigi siajn religiojn. En diversaj epokoj kaj lokoj, kristanoj persekutis islamanojn, kaj inverse islamanoj kristanojn – kaj ankaŭ ene de

religioj okazis persekutado.

Kvankam li ne intencis perforte konverti, Chau iris al tiu insulo kun plena malrespekto al la kredoj kaj tradicioj de ĝiaj loĝantoj, kaj al hinda leĝaro, kiu malpermesas eĉ proksimiĝon al la insulo (por prokitekti la insulanojn de fremdaj malsanoj, kaj eksterulojn de la insulanoj). Estis kristana aroganteco, kiu motivigis lin. En sia taglibro, li eĉ nomis la insulon “la lasta fortikaĵo de Satano”. La tribo verŝajne loĝas tie jam de jarmiloj, ne ĝenas aliajn, nur deziras esti lasita en paco, ne bezonas fremdajn fervorulojn kun biblio. Ĝis nun la tribanoj sukcesis defendi sin. Pli grandskale, en la Amerikoj, la indiĝenaj civilizacioj ankaŭ alfrontis fremdajn zelotojn, kiuj portis bibliojn. Tiuj fremduloj, katolikaj konkerantoj, estis armitaj kaj altrudis sian religion kaj lingvon, sklavigis grandan parton de la loĝantaroj, detruis iliajn sociojn.

En tiu ĉi numero, vi povas legi pri persekutado kaj perfortado fare de unu grupo de kristanoj kontraŭ alia en antaŭaj jarcentoj (la agresantoj estis katolikoj, la viktimoj “herezuloj”). La vortoj “herezo” kaj “blasfemo” ŝajne apartenas al alia epoko, sed bedaŭrinde “blasfemo” ankoraŭ ekzistas kiel krimo en la leĝaro de diversaj landoj, eĉ membroj de la Eŭropa Unio kiel Pollando. La apartigo de ŝtato kaj religio estis fakte la ĉeftemo de la ATEO-kunveno ĉe la ĉi-jara UK en

Historiaj Perspektivoj

Lisbono. Tiu apartigo ne ekzistas en multaj landoj (en preskaŭ ĉiuj landoj kun islamana plejmulto, sed ankaŭ en landoj kiel Israelo), aŭ estas nur parta, kiel en Pollando, aŭ estas endanĝerigita kiel nun en Brazilo kaj Hindio/Barato. Sed okazas rezisto kaj pozitivaj ŝanĝoj kiel en Argentino, kie okazas movado por

apostatigo; Irlando, kie en referendumo du-trionoj de voĉdonantoj decidis forigi blasfemon el la konstitucio; kaj Grekio, kie la ortodoksa ne plu estas la oficiala ŝtata eklezio. Mi invitas vin tralegi tiun ĉi numeron, kaj informiĝi pri tiuj ĉi kaj aliaj interesaj temoj.



Persekutado de la Valdanoj

Kiam en septembro 2018 mi feris en la itala insulo Elba, mi pasigis tri noktojn en gastejo nomita Casa Valdese en la urbeto Rio Marina. Rezervante ĉambron tie per Booking.com, mi ne supozis, ke ĝi estas io eksterordinara. Sed kiam mi alvenis mi malkovris, ke la gastejo apartenas al la Valdana eklezio! La vorto *valdese* signifas “valdano”. Ĉe la akceptejo estis informiloj pri la reto de valdanaj gastejoj en Italio. Ili klarigis, ke la gastejoj enspezoj estas asignitaj al la bonfaraj agadoj de la Valdana eklezio, inkluzive helpon al rifuĝintoj. Do mi esploris la historion de la valdanoj kaj eksciis, ke ili estis longe persekutataj de la katolikoj.

En la numero de Novembro 2017 de tiu ĉi bulteno, aperis artikolo pri Jan Hus kaj la husana movado, en kiu mi skribis, ke la husanoj estis antaŭuloj de la protestantoj. Nu, la valdanoj estis eĉ pli fruaj antaŭuloj. Ilia movado komenciĝis jam en la 12a jarcento, kaj ili poste ricevis sian nomon de Petro Valdo (ĉ. 1140 – ĉ. 1217),

komercisto el Liono, Francio, kiu spertis transforman spiritan momenton en 1174 kaj fordonis siajn riĉaĵojn al malriĉuloj. Sekve, li komencis mem vivi malriĉule kaj vojaĝe prediki. Fakte, la movado unue nomiĝis la Malriĉuloj de Liono, kaj disvastiĝis el Francio al Italio kaj aliaj landoj. La valdanoj kredis je konformado al la instruoj de la Biblio, volonta malriĉeco kaj laika predikado (ankaŭ fare de virinoj) en lokaj lingvoj. Ili fakte estis la unuaj, kiuj tradukis partojn de la Biblio el la latina en lingvon de Francio, ĉi-kaze la provencan. Ili kritikis la koruptigon kaj riĉecon de la katolika klerikaro kaj malakceptis multajn katolikajn superstiĉojn kaj ritojn, kiel la sanktan komunion. Pro tiuj ĉi kialoj, ili plaĉis al multaj ordinarnaj homoj.

Nesurprize, la katolika eklezio kaj katolikaj regantoj ne estis kontentaj pri la aŭdace malortodoksaj sintenoj de la valdanoj. Nelonge post kiam Valdo komencis sian agadon, ili reagis forte. Jam

Historiaj Perspektivoj

en 1179 la papo malpermesis al la valdanoj prediki sen la permeso de katolikaj episkopoj – sed ili rifuzis obei, do en 1184 Valdo kaj liaj anoj estis ekskomunikitaj kiel skismanoj kaj forpelitaj de Liono. Komenciĝis 700 jaroj da persekutado kaj diskriminacio kontraŭ la valdanoj. En 1208 estis lanĉita kruela 20-jara krucmilito en suda Francio kontraŭ la kataroj (multe pli granda hereza sekto iom simila al la valdanoj), en kiu ankaŭ multaj valdanoj estis mortigitaj. En 1215 la Kvara Laterana Koncilio de la katolika eklezio oficiale deklaris la valdanojn herezuloj kaj en 1229 estis starigita la unua Papa Inkvizicio, kies ĉefaj viktimoj estis ĝuste la kataroj kaj valdanoj. Sekve, multaj valdanoj fuĝis al la valoj de la nordokcident-italaj Alpoj, kiuj ekde tiam fariĝis ilia ĉefa hejmlando kaj akiris la nomon “La Valdananaj Valoj”. Sed valdanismo ankaŭ disvastiĝis de suda Francio kaj norda Italio al suda Italio, Germanio kaj aliaj eŭropaj landoj. En Bohemio en la 14a jarcento, la valdanoj unuiĝis kun la husana movado.

La persekutado de la valdanoj daŭris en la 14a jarcento. La francaj papoj de Avinjono (kiam la papa sidejo estis movita tien de Romo) perforte subpremis valdanojn kaj aliajn herezulojn en sudorienta Francio. Kaj ankaŭ en Germanio, Bohemio, Hungario kaj Svislando okazis inkvizicia persekutado. En la lasta jardeko okazis ekzekutado de

germanaj valdanoj en Rejnlando laŭ ordono de katolik-ekleziaj instancoj. Dum la sekvonta jarcento, unu jaro elstaras: 1487. Papo Inocento la 8a, en



Bruligado de Valdanoj en Francio

(Fonto: Wikimedia / Bildo farita de nekonata gravuristo)

denova montro de kristana humaneco kaj moraleco, per buleo ordonis la eksterminadon de la valdanoj – iu, kiu mortigis valdanon eĉ havis rajton preni ties posedaĵojn. La rezulto estis dujara krucmilito en Piedmonto kaj Savojo, en kiu multaj valdanaj vilaĝoj estis detruitaj, iliaj loĝantoj mortigitaj, rabitaj, seksperfortitaj.

Dum la sekvontaj 200 jaroj, la valdanoj spertis gravajn okazaĵojn. Je la pozitiva flanko estis la Reformacio, al kiu ili formale aliĝis en 1532, kio donis al ili

Historiaj Perspektivoj

potencajn alianculojn; la Traktato de Cavour (1561), kiu unuafoje donis al ili la rajton praktiki sian kredon kaj loĝi en specifaj teritorioj; kaj la Nanta Edikto (1598), kiu certigis al francaj protestantoj, inkluzive la valdanojn, gamon da rajtoj. Je la negativa, okazis grandskala detruado de vilaĝoj kaj masakroj en Provenco (1545), en Kalabrio kaj Piedmonte (1560), en 1655 dum la “Piedmonta Pasko”, kiam ĝis 6,000 valdanoj estis masakritaj ĉar ili malobeis dekreton katolikiĝi ene de tri tagoj aŭ forlasi siajn hejmojn. La travivintoj de la sanga pasko lanĉis gerilan militon gvidatan de la legenda Joŝua Janavel kaj kun helpo de internacia premo sukcesis reveni hejmen. En 1685 la Nanta Edikto nuligis Ludoviko la 14a, kiu instigis la Dukon de Savojo renovigi la persekutadon – miloj da valdanoj estis denove masakritaj. Sekve multaj fuĝis al Svislando, sed en 1689 grupo de kelkcent revenis, batalante survoje. Bonŝance la Duko aliĝis al kontraŭfranca alianco kaj haltigis la persekutadon.

Kvankam la masakroj fine ĉesis, dum la 18a jarcento la valdanoj daŭre suferis diskriminacion. Ili estis efektive fermitaj en getoj en siaj italaj montaraj valoj, dependaj de helpo de protestantaj ŝtatoj. Nur pro la Franca Revolucio kaj Napoleono la limigoj kontraŭ ili estis forigitaj. Sed denove ekde 1815 la piedmontaj valdanoj suferis

diskriminacian traktadon kiam la tiama Duko nuligis napoleonajn liberecojn. Ili devis atendi ankoraŭ pli ol 30 jarojn ĝis 1848, kiam la savoja-sarda reĝo Karlo Alberto deklaris la emancipiĝon de la valdanoj. Sekve, la valdanoj komencis agadi tut-italie kaj ankaŭ elmigris al la Amerikoj. La unuiĝo de Italio en 1871 kaj la malapero de la Papaj Ŝtatoj donis al ili eĉ pli da libereco agi kaj disvolviĝi. Menciindas, ke dum la Dua Mondmilito, la valdanoj multe helpis alian persekutatan grupon, la judojn, kaŝante ilin en siaj valoj. Sed, nekredeble, nur en 1984 la valdanoj finfine ricevis plenan egalrajtecon kun la katolikoj en Italio! Kaj nur en 2015 la papo finfine pardonpetis al ili pro la jarcentoj da persekutado fare de la katolikoj.

Kial gravas por ni ateistoj tiu ĉi longa historio de persekutado kontraŭ unu kristana grupo fare de alia? Unue, ĉar la valdanoj jam de jarcentoj subtenas religian liberecon kaj apartigon de ŝtato kaj religio. Tial, laŭ mi, ili estas naturaj aliancanoj de ateistoj kaj humanistoj. Due, ĉar ili estas progresema grupo, kiu estis fondita surbaze de helpo por malriĉuloj, kaj ankoraŭ nun estas tre aktiva en bonfarado (fakte multaj nevaldanaj italoj subtenas ilin per impost-asignado), kaj kiu ekde sia komenciĝo praktikis egalrajtecon de virinoj. Tria, ĉar ili estis dum jarcentoj viktimoj de unu el la plej grandaj malamikoj de libera pensado

Historiaj Perspektivoj

kaj homaj rajtoj, la katolika eklezio – ilia batalo estis la batalo de ĉiuj, kiuj batalas por libereco.

Nyegosh Dube (Pollando)

Artikolo verkita surbaze de informoj en Vikipedio, waldensian.info, museeprotestant.org, waldensiantrailoffaith.org, waldensian.org, gotquestions.org/waldensians.html kaj academia.edu



Katolikoj kaj la itala politiko dum la pasinta jarcento kaj nun

Enkonduko

Katolikaj italoj estas koncepto, kiun oni devas klarigi por neitaloj. En Italujo ĉiuj naskiĝas kiel katolikoj, kiel ĉiuj svedoj naskiĝas kun blondaj haroj. Kaj la blondaj haroj de la svedoj kaj la katolikeco de italoj havas malgrandan rilaton kun iliaj ideoj pri tio, ĉu la papo estas ne eraripova, ĉu ekzistas la paradizo kaj la infero post la morto, ĉu Kristo estis homo aŭ dio.

Alivorte italoj estas denaske skeptikaj, kaj ĉiuj grandaj ideoj, religiaj aŭ politikaj, estas kredataj nur laŭŝajne sed ne tre profunde. En Italujo katolikismo ne havas kunligon kun nacia identeco kiel en Pollando, ekzemple. Eĉ male. La plej konata italo, Giuseppe Garibaldi [ĝuzepe garibaldi] estis forta kontraŭreligiulo kaj la tuta movado por la renaskiĝo de unuiĝinta Italujo, Risorgimento [risorgimento], estis farita de partio grandparte kontraŭa al la Papo, kiu tiam regis unu el la pluraj sendependaj regnetoj en Italujo.

Rilatoj inter la itala katolikismo kaj politikaj movadoj

La rilatoj inter la unuiĝinta Italujo kaj la itala eklezio restis streĉaj dum 60 jaroj. En la komenco de la pasinta jarcento, kiam furoris la socialismaj ideoj, katolikoj kreis progresemajn movadojn kaj partiojn, kiuj favoris pli bonajn kondiĉojn por la laboristoj kaj por Suda Italujo. Tiuj estis malpermesataj de la faŝisma registaro en la unuaj jaroj 1920-aj. En 1929 Mussolini [musolini] kaj la faŝisma registaro faris interkonsenton kun la eklezio, kiu rekonis la ekziston de Italujo, dum Italujo deklaris sin oficiale katolika kaj konsentis, ke en ĉiuj lernejoj oni instruu religion pere de katolikaj pastroj. De tiam ĝis nun la katolika eklezio ĉiam subtenas dekstrajn aŭ centrajn politikajn partiojn.

Post la dua mondmilito oni rekreis la partion “Kristana Demokratio” de la komenco de la jarcento, kiu estis centra partio favora al NATO kaj al ekonomia

Historiaj Perspektivoj

liberismo. Tiam la granda kontraŭa forto de ĝi estis la komunisma partio, kaj fakte la 1-an de julio 1949, la itala episkoparo, kun la aprobo de la papo, aperigis ekskomunikon deklaron por ĉiuj, kiuj legas komunismajn gazetojn aŭ librojn, subtenas komunismajn partiojn, ktp.

Bonŝance italoj, kaj komunismaj kaj katolikaj, ne tro serioze sekvis la deklaron. Teorie komunisto ne rajtis geedziĝi en preĝejo (kio tiam estus grandega skandalo kaj problemo por la bopatrinoj). Oni pretervivis tiun krizon kaj la itala komunisma partio daŭre kreskis, dum la kristandemokrata partio daŭre regis.

Tiu deklaro ne plu estis aktuala ekde la 1960-aj jaroj kaj la eklezio daŭre perdis influon inter la loĝantaro kaj eĉ malgajnis la batalon de la referendumo pri eksgeedziĝo en la unuaj jaroj 1970-aj, por ne paroli pri la bataloj kontraŭ la leĝo pri abortigo en postaj jaroj.

La kristandemokrata partio malaperis en la fruaj 1990-aj jaroj pro multenombraj juĝprocedoj pri koruptado. De tiam oficiale ne plu estas katolika partio, kvankam kelkaj centraj partioj deklaras sin tiaj. En la nova situacio la katolika eklezio ludis ankoraŭ pli malgrandan rolon, kaj la nuna progresema papo klare estas kontraŭ la dekstraj politikoj de la nuna itala registaro. Intertempe ŝajne ekestas kaj fortiĝas dekstraj grupoj en la eklezio, kiuj estas mem kontraŭaj al la papo kaj al liaj tro demokrataj sintenoj pri pluraj problemoj. Ĉi tiuj dekstraj grupoj (kiuj havas mezepokajn sintenojn pri ĉio, inkluzive de deservoj en la latina) emas esti ligitaj al la nunaj italaj dekstraj registaraj partioj, sed temas ankoraŭ pri malmultaj kaj nestabilaj kontaktoj, kiuj povus evolui, laŭ la evoluo de la politika vivo en Italujo.

Renato Corsetti (Italio)



Apartiĝo inter ŝtato kaj religio en Portugalio

La regno de Portugalio fondiĝis en la jaro 1143 per la traktato Samora subskribita de la reĝo de Leono kaj Kastilio agnoskinte la sendependecon de Portugalio, ĝis tiam kunligita graflando; kaj per buleo, en la jaro 1179 la papo Aleksandro III agnoskis la suveranecon kaj sendependecon de la portugalia regno

sub protekto de la roma eklezio.

Do, ekde sia naskiĝo Portugalio estis katolika ŝtato. Tiu fideleco al la roma eklezio daŭris ĝis la komenco de la 20a jarcento. Kio ankaŭ signifis, ke aliaj religioj daŭre estis persekutataj, precipe la islama kaj juda, sed ankaŭ tiuj kiuj

Historiaj Perspektivoj

aperis post la Reformacio.

Pri la rilato inter la ŝtato kaj religio ni atentu pli koncize la situaciojn de la kvar lastaj historiaj periodoj: la monarkio liberala de la 19a jarcento, la unua respubliko de 1910, la tiel nomata Nova Ŝtato post 1926 kaj la demokrata reĝimo post 1974.

La monarkio liberala (19a jarcento)

La konstitucioj de 1822, 1826 kaj 1838 proklamis la “religion katolikan apostolan romanan” kiel la oficiala religio de la ŝtato; kaj nur la lasta permesis aliajn religiojn ol la katolika, sed nur por eksterlandanoj (en taŭgaj lokoj sed sen la tradicia preĝeja formo).

La unua respubliko (1910-1926)

En la lasta trimonata periodo de la jaro 1910 stariĝis la respubika reĝimo kaj tuj ekaperis apartaj politikaj rimedoj, kiuj ekapartigis ŝtaton kaj religion. Ekzemple:

- nuligo de ĵurado de religia karaktero
- nuligo de ferio de la “sanktaj tagoj”
- malpermeso al la armeo partopreni en religiaj ceremonioj
- leĝo pri eksgeedziĝo kaj la familio, kiu difinas geedziĝon kiel civilan kontrakton
- permeso al iu ajn religio en funebraj ceremonioj

En la jaro 1911 kaj la respublika konstitucio kaj la leĝo pri religia libereco starigis la nereligiecan karakteron de la respubliko. Ambaŭ dokumentoj garantias liberon de kredo kaj konscio krom politikan kaj civilan egalecon de ĉiuj religioj. Tamen nur la leĝo mem klare dekretis, ke la “religio katolika apostola romana” perdas sian statuson kiel ŝtata religio.

La nova ŝtato (1926-1974)

En la jaro 1926, okazis militista puĉo, kiu ŝanĝis la karakteron de la respubliko de 1910 (enkondukiĝis faŝisma “Nova Ŝtato”). Iom post iom ŝanĝiĝis la situacio koncerne la apartigon inter ŝtato kaj religio. Estis: malgrandigita la rajto de libera organizado de religio (leĝo n-ro 1855 de la jaro 1935); proklamita la celo de la publika instruado kiel kreado de moralaj virtoj “gvidata de la doktrinaj principoj kristanaj” (leĝo 1910 de la jaro 1935); starigita konkordato inter la portugala ŝtato kaj la Sankta Seĝo (1940aj), kiu nuligis la leĝon pri religia libereco de 1911 kaj revenigis la superecon de la katolika eklezio; deklarita la katolika religio kiel “la religio de la portugala nacio” (leĝo n-ro 2048 de 1951). (Noto: en la nova leĝo pri religia libereco de 1971 malpliigis la limigojn pri aliaj religioj kaj la katolika estas redifinita kiel “tradicia religio de la portugala nacio”).

Religiaj Demandoj

La demokratia epoko (1974 – nuntempo)

En la jaro 1974 okazis militista puĉo, kiu finis la tiel nomatan Novan Ŝtaton kaj ebligis eniron en demokratian periodon. La nova konstitucio (1976) proklamas principojn de libereco de konscienco, religio kaj adorado; permesas pro-konsciencan militserv-rifuzon; apartigas ŝtaton kaj ekleziojn; garantias liberan praktikadon de ekleziaj funkcioj (eĉ religia instruado); proklamas la publikan instruadon nekonsfesian, tamen senobstakle al religia instruado.

jaro 2001. Kaj la konstitucio kaj la leĝo devigis la modifiĝon de la konkordato inter la ŝtato kaj la Sankta Seĝo. Tiu dividis la konstituci-analizistojn inter tiuj, kiuj subtenis nuligon de la konkordato kaj tiuj, kiuj konsideris novan konkordaton akorda al la leĝoj de la ŝtato. La unuaj reliefigis, ke statuto, kiu kreis favoran situacion por unu el la religioj estas kontraŭkonstitucia; la duaj, ke la konkordato devus esti modelo, laŭ kiu aliaj religioj havu siajn konkordatojn kun la ŝtato. Nova konkordato kun la katolika eklezio estis leĝigita en la jaro 2004.

Nova leĝo pri religia libereco aperis en la

Luís Ladeira (Portugaliao) ★

Ĉu Dio apartenas al la genro *Homo*?

Antaŭ ol provi respondi al tiu – verŝajne al multaj, sufiĉe stranga aŭ ridinda – demando, oni devas demandi: ĉu oni eĉ povas / rajtas demandi kiel aspektas Dio, kian formon havas Dio? Certe homoj tra la jarcentoj havas diversajn imagojn pri li / ŝi / ĝi (kiun pronomon uzi – tio mem estas parto de tiu demando!). Ateistoj, kiel ni bone scias, havas simplan respondon: li ne ekzistas, do ne havas aspekton, aŭ pli ĝuste, la demando estas sensenca. Por politeistoj, ne estas granda problemo, ĉar por ili temas pri diverseco de dioj, kaj oni ja povas bildigi ilin. Fakte, ateistoj devus demandi al monoteismaj kredantoj: kiel aspektas la unu Dio je kiu vi kredas? Kompreneble, kredanto povus respondi,

ke Dio estas nevidebla forto aŭ senkorpa, senvizaĝa estaĵo (Zamenhof parolis pri la “senkorpa mistero”).

Bone, sed la Biblio proponas ian aspekton. En la libro de Genezo, ĉapitro-verso 1:27, oni havas almenaŭ nerekantan priskribon de Dio, ĉar estas skribite: “Kaj Dio kreis la homon laŭ Sia bildo, laŭ la bildo de Dio Li kreis lin; en formo de viro kaj virino Li kreis ilin.” Do, tio ŝajne signifas, ke Dio apartenas al la genro *Homo*! Eble li estas la unua membro de tiu genro, la pra-*Homo*. Kaj ni havas la respondon al la titol-demando de tiu ĉi artikolo. Eble ni povus diri, ke Dio estas la sola membro de la specio *Homo divinus*,

Religiaj Demandoj

grandega Hom-speciano, kiu loĝas ie (ĉie?) en la universo – aŭ eble ekster la universo, ĉar laŭ kredantoj, estis li, kiu kreis ĝin. Pentristoj kiel Mikelaĝelo klare bildigis Dion kiel homon – rigardu la faman pentraĵon “La kreo de Adamo” en la Siksta Kapelo en Romo. Tie Dio estas pentrita kiel maljuna viro kun longaj blankaj haroj kaj blanka barbo. Kristanoj ja parolas pri Dio kiel “Patro nia”. Cetere, en la Biblio, speciale la Malnova Testamento, Dio estas priskribita kvazaŭ homa reĝo, tirano, kun absoluta potenco, kolerema, venĝema, mortigema.

Diversaj teologoj kaj filozofoj provas klarigi la genezan priskribon “laŭ Sia bildo” alimaniere: ke Dio transdonis diversajn diajn kvalitojn al la homoj, speciale racion, penso-kapablon, kompren-kapablon, liberan volon. Tamen, en tiu geneza citaĵo oni ankaŭ legas “en formo de viro kaj virino”. Ĉu tio ne indikas, ke fakte “bildo” signifas fizikan aspekton, aŭ almenaŭ inkluzivas fizikan aspekton? Ankaŭ tio signifus, ke la *Homo divinus* estas ambaŭseksa – hermafrodito iasence, ĉar li/ŝi evidente aspektas kaj kiel viro kaj kiel virino! Laŭ specialistoj pri la Malnova Testamento, la hebrea vorto por “bildo” (*selem*) verŝajne kombinas fizikajn kaj spiritajn elementojn.

En Islamo estas iom konfuze: unuflanke, laŭ la Korano, nenio similas al

Dio, sed laŭ unu el la haditoj (supozataj diraĵoj de Mahometo, traktataj kiel gravaj fontoj de la islama kredo), Adamo estis kreita laŭ la bildo de Dio, do homoj ĝenerale tiel kreigis, kaj ni revenas al Genezo. Sed islamaj teologoj kaj klerikoj asertas, simile al multaj siaj kristanaj ekvivalentoj, ke tio rilatas al diversaj kapabloj (ekz. aŭdado, vidado, pensado) kaj spiritaj ecoj, ne al la fizika aspekto. Islamo tute malpermesas fizikan bildigon de Dio kaj eĉ de Mahometo, do ne ekzistas pentraĵoj de Dio en la islama mondo, kiel tio en la Siksta Kapelo.

Tamen, eĉ se oni ne serioze asertas, ke Dio estas ia giganta homa estaĵo, kaj male asertas, ke la frazo “laŭ Sia [t.e. dia] bildo” temas pri nefizikaj atributoj, ekzistas seriozaj problemoj rilate al la koncepto de simileco inter Dio kaj homoj. Dion karakterizas esence senfineco, perfekteco kaj transcendeco. Neniu el tiuj aplikeblas al homoj eĉ parte – tio simple ne eblas. Oni ne povas esti parte senfina, parte perfekta, parte transcenda! Jes, homoj povas esti almenaŭ parte bonaj kaj saĝaj – ĉiuj kondutas foje bone, foje malbone, foje saĝe, foje malsaĝe. Dio supozeble estas perfekte bona kaj saĝa. Sed la tre evidentaj kaj oftaj malboneco kaj malsaĝeco de homoj igas similigon al Dio sensenca.

Laŭ unu islama retejo, kiu diskutas tiun demandon, temas nur pri la fakto ke Dio

Religiaj Demandoj

ĉion vidas, ĉion aŭdas, ĉion scias, kaj Adamo, do la homaro, estis kreita kun la kapabloj vidi, aŭdi, scii. Tamen la dia vido/aŭdo/scio estas senfina, perfekta, absoluta, dum la homa ne estas tia. La problemo estas, ke tia argumento unuflanke denove homigas Dion per

atribuado de homaj kapabloj sed en plivastigita formo, kaj aliflanke, asertas dispartigeblon de senfineco, perfekteco, absoluteco, kio vere estas kontraŭlogika. Laŭ alia islama



retejo, temas pri Dio kronas Jesuon kaj la Virgulinon Maria – trajtoj donitaj de Dio detalo el la pentraĵo “La Kronado” de Carlo al la homoj kiel racio, Crivello, Muzeo Brera, Milano plivastigo, scio, kapablo (Foto farita de la redaktoro) plipotencigo, mastrumi la teron. Do homoj estas vic-regantoj, reprezentantoj de Dio sur la Tero. Simple dirite, ĉi tiuj du islamaj vidpunktoj ambaŭ asertas, ke Dio donis al la homoj ĉiujn iliajn kapablojn fizikajn kaj intelektajn – kaj iel, iugrade tiuj ĉi estas trajtoj, kiujn havas Dio mem, sed en tute alia skalo.

Nu, kion konkludi? La vera signifo de la frazoj “Dio kreis la homon laŭ Sia bildo” kaj “Alaho kreis Adamon laŭ Sia bildo” estas neklara. Teologoj, klerikoj kaj aliaj anoj de

kristanismo, judismo kaj islamo havas diversajn ideojn – kvankam verŝajne neniuj el ili pensas, ke Dio estis la unua *Homo* kaj poste kreis rason de surteraj homoj laŭ sia propra formo! Tamen por provoke kaj petole iniciati diskuton, estus bone demandi ilin: ĉu la aserto, ke

homoj estis kreitaj laŭ la bildo de Dio signifas, ke via Dio estas giganta, ĉiela homo? Verdire, pli klare estas, ke *homoj kreis Dion laŭ siaj bildo kaj*

imago. Dio estas sufiĉe evidente plivastigo, plipotencigo, senfinigo, perfektigo de homo, kaj la verkistoj de la Biblio kaj de la islamaj sanktaj tekstoj, simple renversis la deven-sinsekvon, tiel ke homoj devenis de Dio kaj estis kreitaj laŭ lia [t.e. dia] bildo. La inventistoj de religioj, la rakontistoj de la sanktaj tekstoj, ne mem vidinte Dion, ne rekte eksciinte ion ajn pri li (per iaspeca scienca aliro), inventis liajn ecojn surbaze de la sola modelo, kiun ili konis: *Homo sapiens*.

Nyegosh Dube (Pollando) ★

Religiaj Demandoj

La releviĝo de Jesuo: dubinda miraklo

Por pli-malpli ĉiuj kristanoj, eĉ por sufiĉe “modernaj” inter ili, la “releviĝo” de Jesuo restas centra elemento de ilia kredo. Aliajn eventojn rakontitajn pri li ne malpli miraklajn, ekzemple la plimultigon de pano kaj la forpelon de diversaj demonoj, eĉ la naskiĝon el virĝulino, kleraj kredantoj ofte interpretas kiel folklorecajn aldonajojn kaj ne konsideras ilin kiel kredendajn “verojn”. Ili provas koncentriĝi je la mesaĝo de la “majstro”, kiu prefere ne estu nebulita per nekredindaj ornamaĵoj, kaj klarigas miraklajn kromaĵojn plejparte kiel simbolojn: “modernaj” kredantoj permesas al si opinii, ke ekzemple la raportita naskiĝo el virĝulino ne estu komprenata en strikte biologia senco, sed ke ĝi estas stilrimedo por emfazi la unikecon de la persono de Jesuo.

Sed unu el tiuj mirakloj ŝajnas esti vere bezonata kaj ne interpretebla kiel mitologia elemento: la releviĝo de Jesuo el la mortintoj. La apostolo Paŭlo¹ vortumas jene en sia unua letero al la Korintanoj:

“...se Kristo ne releviĝis, vana ja estas nia predikado, vana ankaŭ estas via fido.” (1 Kor 15, 14) 2

Sed ĝuste la raporto pri tiu releviĝo

estas ege mirakleca. Ĉe la evangeliisto Mateo oni trovas:

“Kaj jen okazis granda tertremo; ĉar anĝelo de la Eternulo malsupreniris el la ĉielo, kaj derulis la ŝtonon, kaj sidigis sur ĝi. Lia aspekto estis kiel fulmo, kaj lia vestaĵo estis blanka, kiel neĝo; kaj pro timo al li la gardistoj tremis, kaj fariĝis kiel malvivuloj.” (Mat 28, 2-4)

Por nekredanto ŝajnas klare, ke tiaj anĝeloj ne ekzistas kaj certe ne movas ŝtonojn. Sed evidente kristanoj devas reteni la kernon el tiu miraklo, nome, ke Jesuo post sia entombiĝo reviviĝis kaj releviĝis. Pri tiu kerno kristano ne rajtas dubi, ĉar tiam li aŭ ŝi devus dubi konsekvence pri sia propra pluvivo post la morto.

Nekristano tamen, kiu interesiĝas pri religioj ĝenerale kaj speciale pri la fontoj kaj fonoj de kristanismo, povas demandi, kio fakte okazis post la entombigo de Jesuo. Se oni supozas – kaj la plej multaj historiistoj ne plu dubas pri tio – ke Jesuo estas vere ekzistinta historia persono, oni ja povas esplori, ĉu indikoj pri la realaj faktoj estas eventuale troveblaj. Ekzistas ja legendoj pri pluvivo de Jesuo; ekzemple, ke nur kvazaŭ-korpo ŝajne mortis sur la kruco, dum la reala Jesuo

Religiaj Demandoj

mirakle estis translokita al Hindio kaj vivis tie ankoraŭ multajn jarojn. Sed tiamaniere oni nur anstataŭigus unu miraklan legendon per alia.

Sed interesan indikon oni trovas, dume, en la evangelio de Mateo mem. Jen raporto pri kalumnio:

“ Kaj dum ili³ iris, iuj el la gardistoj venis en la urbon, kaj rakontis al la ĉefpastroj ĉiujn okazintaĵojn. Kaj kunveninte kun la pliaĝuloj, ili konsiliĝis kune, kaj ili donis al la soldatoj multe da mono, dirante: Diru: Liaj disĉiploj venis nokte, kaj forŝtelis lin, dum ni dormis. Kaj se la provincestro tion aŭdos, ni konvinkos lin, kaj liberigos vin de ĉia zorgo. Kaj ili prenis la monon, kaj faris, kiel ili estis instruitaj; kaj tiu diro disvastiĝis inter la Judoj ĝis hodiaŭ.” (Mat 28, 11-15)

La evangeliisto volis, kompreneble, malpravigi tiun ĝenan “diron”, sed simple prisilenti ĝin li tamen ne povis, ĉar, kiel li eksplicite skribas, tiu “diro” estis rakontata (kaj evidente ankaŭ kredata) ankoraŭ en la tempo de la ekesto de la teksto (“ĝis hodiaŭ”) – t.e. ĉirkaŭ la jaro 70 p.K., kiam la evangelio de Mateo supozeble estis verkata. Por la aŭtoro do estis grava zorgo emfaze kontesti tiun (laŭ li) mensogan diron pri la ŝtelo de la korpo de Jesuo. Sed kial ne supozi, ke ĝuste tiu ŝtelo fakte okazis?

Imageble estas, ke iuj el la disĉiplaro ne toleris la imagon, ke la kadavro de ilia adorita majstro nun putriĝos en tombo, kaj ke ili do havigis al si la korpon por povi plue adori ĝin. Alia ebleco estas, ke la tuta disĉiplaro post interna interkonsilado decidis, ke la kadavro estu sekrete ŝtelita el la tombo por ebligi tiamaniere la rakonton pri mirakla reviviĝo. Poste – post iom da jaroj – la apostolo Paŭlo metis tiun “miraklon” en teologian kadron deklarante ĝin centra elemento de la kristana kredo.

Postaj komentistoj iom okupiĝis pri tiu alineo, kiu rakontas pri la ŝtelo de la kadavro. En iu eldono de la Nova Testamento mi trovis komenteton pri la citita loko. La argumento estas, ke tiu rakonteto estas tute neverŝajna inventaĵo, ĉar romia provincestro certe ne estus pardoninta tian misagon de siaj “gardistoj” – sed tiu argumento ŝajnas ege malforta. Unue: Pri la kariero de Pilato kelkaj historiaj faktoj estas konataj, kaj evidentiĝas, ke li estis ege avida kaj korupta persono. Sufiĉe da mono do certe estus facile trankviliginta lian koleron. Kaj due: Kiel do moderna komentisto povus taksu la reagon de persono, kiu agis antaŭ dumil jaroj, dum samtempanoj de Mateo evidente opiniis, ke tia reago de Pilato estas kredebla?

Winfried Schumacher (Germanio)

Ĉirkaŭ la Mondo: Novaĵoj kaj Tendencoj

¹Mi nomas la aŭtoron “Paŭlo”, sekvante la tradicion; mi konscias, ke la aŭtoreco ne estas certa, sed mi simple volas eviti komplikajn vortumojn kiel “la aŭtoro de la t.n. 1-a letero al la Korintanoj”. Koncerne la aŭtorojn de la evangelioj mi agos sammaniere.

²Mi citas el la “Nova Testamento” laŭ la traduko de Zamenhof.

³“ili”: la virinoj vizitintaj la tombon de Jesuo kaj forsenditaj de li al la disĉiploj.



Argentinanoj forlasas la eklezion, luktas por abortigrajto

Amasa rezigno el la katolika eklezio

En la somero de 2018, dek tagojn post kiam la Senato malaprobis la laŭleĝigon de memvola abortigo, centoj da argentinanoj partoprenis kolektivan apostatecon, postulante apartigon de eklezio kaj ŝtato. “Plenigu la formularon, kunmetu fotokopion de via identigilo, alian de via bapto-atesto, kaj ni okupiĝos pri ĉio.” Ĉe la angulo de la grandaj avenuoj Callao kaj Corrientes, kore de la argentina ĉefurbo Bonaero, César Rosenstein donas instrukciojn al la estontaj apostatoj. Tiu membro de la Argentina Koalicio por Laika Ŝtato (CAEL) ne atendis tian homamasigon: “De dek jaroj, ni luktas favore al apartigo de eklezio kaj ŝtato. Sed unuafoje mi vidas tion da personoj pretaj kolektive rezigni la katolikan konfesion”.

La principo estas simpla: kun tiuj kelkaj dokumentoj enmane, ĉiu povas postuli eksigon el la katolika eklezio: “Tio signifas konkrete, ke la eklezio ne povas enkalkuli nin inter siaj membroj. En la

parohaj registroj, apud nia nomo aperos la mencio ‘apostato’. Ni preferus tamen, ke la nomo estu tutsimple forviŝita,” klarigas Rosenstein. CAEL poste transdonis tiujn petojn pri apostateco al la episkopa konferenco de Bonaero.



Argentinanoj plenigas formularojn por eksigi de la katolika eklezio

Lukto por laŭleĝa abortigo

En Latin-Ameriko, regiono grandparte katolika, memvola abortigo estas permesata nur en kelkaj landoj (nur Urugvajo, Gujano, Kubo kaj Meksikurbo laŭleĝigis ĝin). Argentino, origina lando de la papo Francisko, kies konstitucio deklaras, ke la registaro “subtenas la

Ĉirkaŭ la Mondo: Novaĵoj kaj Tendencoj

katolikan apostolan romanan konfesion”, ne estas escepto, kaj permesas abortigon nur okaze de seksperforto, aŭ se la gravedeco endanĝerigas la sanon de la virino. Tio ne malhelpas, ke duon-miliono da argentinanoj abortigas kaŝe ĉiujare, laŭ virinaj organizaĵoj – foje ili mortas farante tion, kiel okazis al almenaŭ tri virinoj en aŭgusto, la monato kiam la Senato malakceptis laŭleĝigon.

“Laŭleĝa abortigo ĉe la malsanulejo!” skandas kelkaj junulinoj, kiuj atendas realigi sian apostatecon. Kelkaj tenas enmane verdajn flugfoliojn, sur kiuj estas legeble “La lukto daŭras”. Kvankam 2019 estas balotjaro, la leĝpropono por laŭleĝigi abortigon havas malmulte da ŝancoj esti decidita de la Kongreso antaŭ la jaro 2020.

Eklezio granda, sed kredo malgranda

“Argentino estas hipokrita lando. Ni ĉiuj estas baptitaj ĉar tio estas la kutimo, ni geedziĝas ĉar tio estas la kutimo, sed tre malmulte da argentinanoj frekventas meson dimanĉe, kaj estas veraj praktikantoj”, opinias Julieta Arosteguy.

Laŭ opinienketoj, 66% da argentinanoj

konsideras sin katolikaj, sed el tiuj apenaŭ 20% praktikas la religion. Ĝenerale, nur 35% da argentinoj konsideras religion io tre grava en sia vivo, kaj 21% estas senreligiaj. Tamen, formale la eklezio havas tiom da membroj, ke ĝi rajtas ĉiujare akiri ŝtatsubvenciojn je ĉirkaŭ 176 milionoj da pesoj (preskaŭ 4.3 milionoj da eŭroj).

“Mi konsideras min agnostikulo. Kio certas, estas ke mi ne plu fidis tiun institucion” asertas Alexis, veninta kun sia familio, por rezigni sian katolikan konfesion. Antaŭ li, liaj infanoj ludas per la verdaj koltukoj de la kampanjo por abortigo, kaj per la nigraj kaj oranĝkoloraj de la kampanjo por apartigo de eklezio kaj ŝtato. Li ridetas: “Ankaŭ ili ne estas baptitaj. Ili faros laŭ sia volo, kiam ili estos plenkreskuloj.”

Redaktita versio de artikolo el la blogo
Neniam Milito Inter Ni
(<http://neniammilitointerni.over-blog.com/2018/08/argentino-centoj-da-argentinanoj-rezignas-pri-la-katolika-konfesio.html>) kun aldonaj informoj el la angla Vikipedio (“Religion in Argentina”).



Ĉirkaŭ la Mondo: Novaĵoj kaj Tendencoj

Kristana faŝismo venas al Brazilo: nova prezidanto

Jair Bolsonaro, la nova prezidanto de Brazilo, estas danĝera kristana faŝisto, kiu promesas transformi Brazilon en kristanan teokration. Promesinte restarigi publikan ordon kaj doni prioritaton al “familiaj valoroj”, Bolsonaro gajnis 55.2% de la voĉdonoj, kio igas lin la venonta prezidanto de la plej granda ŝtato en Latin-Ameriko kaj la kvara plej granda demokratio en la mondo.

Antaŭ sia elekto Bolsonaro sepfoje oficis kiel parlamentano kaj akiris reputacion por rasismaj, kontraŭvirinaj kaj kontraŭgejaj diraĵoj, dum li havis proksimajn rilatojn kun potencaj religiaj konservativuloj kaj ricevis ilian subtenon.

Bolsonaro resumis sian ekstrem-dekstran kampanjon por la prezidanteco per la slogano: “Brazilo antaŭ ĉio, kaj Dio super ĉio.” Pli grave, en elekto-kampanja parolado farita pasintjare, li signalis sian intencon antaŭenigi kristanan teokration en Brazilo, deklarante: “Dio super ĉio. Ne ekzistas ĉi tie sekulara ŝtato. La ŝtato estas kristana kaj la minoritato devos ŝanĝiĝi, se ĝi povos. Minoritatoj devos akordiĝi kun la pozicio de la majoritato.”

Post sia venko, Bolsonaro deklaris al siaj ĝojplenaj subtenantoj: “Ni ne povas

daŭrigi koketadon kun socialismo, komunismo, populismo kaj maldekstra ekstremismo. Ni ŝanĝos la destinion de Brazilo”.

En sia akcept-parolo, Bolsonaro promesis regi laŭ la Biblio. La kristanajn “familiajn valorojn”, kiujn li esperas defendi inkluzivas kontraŭgejajn kaj kontraŭvirinajn sintenojn. Ekzemple, pri samseksemuloj, li diris:

“Se via filo komencas agi gejece, li meritas vangofrapon, kaj sekve li ŝanĝos sian konduton.”.

“Se mi vidos du virojn kisantajn unu la alian en la strato, mi frapos ilin.”

“Mi ne povus ami gejan filon. Mi ne estos hipokritulo pri tio: Mi preferus, ke mia filo mortu en akcidento ol aperi kun gejecaj lipharoj. Por mi, li estus jam morta.”

Pri virinoj li diris: “Mi havas kvin infanojn. Kvar estis knaboj, sed pri la kvina mi malfortiĝis kaj havis filinon.”

“Mi neniam batis mian eks-edzinon. Sed kelkfoje mi pensis pafi ŝin.”

“Mi neniam seksperfortus vin ĉar vi ne

Ĉirkaŭ la Mondo: Novaĵoj kaj Tendencoj

meritas tion.” (Dirita al politikistino.)

Kaj la kristanoj amas lin pro tio.

Krom aprobi kontraŭgejajn kaj kontraŭvirinajn sintenojn, Bolsonaro ankaŭ aprobas rasismojn kaj la torturadon kaj murdado de politikaj kontraŭuloj.

Artikolo el la blogo Progressive Secular Humanism, verkita de Michael Stone, tradukita de la redakcio de Ateismo.



Triumfo por la homaj rajtoj en Grekujo

La greka ĉefministro Aleksis Cipras en novembro 2018 anoncis planojn por maloficialigi la rolon de la Eklezio de Grekujo. Cipras estras la partion Siriza, kiu estis elektita en 2015 surbaze de sekularisma manifesto. Li nun sukcesis ricevi la konsenton de la ĉefepiskopo Ieronimos II, estro de la Grek-Ortodoksa Eklezio.

La ĉefministro intencas modifi la konstitucion de Grekujo por forigi aludojn al la eklezio kaj por difini la grekan ŝtaton “religie neŭtrala”. Por modifi la konstitucion necesos la subteno de 60% de la grekaj parlamentanoj. Por kompensi la kunlaboron de la eklezio rilate al sekularigo, la registaro konsentis doni al ĝi regulan ĉiujaran subvencion de 200 milionoj da eŭroj. Pastroj ne plu estos kalkulataj kiel ŝtatkunuloj.

Kvankam la ortodoksa eklezio konsentis modernigi, iuj pastroj en Grekujo reagis

kolere, minacante ekeston de protestoj kaj “sankta milito”.

Tradicie Grekujo ricevas malaltan rangon en internaciaj tabeloj rilate al religia libereco, ĝuste pro la eksterproportia potenco kaj influo de la Ortodoksa Eklezio.

La ĉefministro intencas modifi la konstitucion de Grekujo por forigi aludojn al la eklezio

Ĝia leĝo kontraŭ blasfemado estas aktive aplikata, kaj restas inter la plej malbonaj en Eŭropo. Preĝado kaj religia instruado estas devigaj en grekaj lernejoj, kaj eĉ sekularaj kortumoj estas ornamataj per kristana figurado. Leĝo permesanta kremacion estis aprobita en 2006, sed pro kontraŭstaro de la Eklezio de Grekujo, la registaro ne sukcesos malfermi la unuan sekularan kremaciejon ĝis 2019.

En la moderna epoko, maloficialigo de la eklezio okazis en Svislando en 1948, Portugalujo en 1976, Hispanujo en

Ĉirkaŭ la Mondo: Novaĵoj kaj Tendencoj

1978, Paragvajo en 1992, Svedujo en 2000, kaj Bolivio en 2009. En 2017 la Eklezio de Norvegujo parte perdis sian oficialan statuson, sed retenis rektan financadon de la ŝtato.

Artikolo el la retejo de Humanists UK ("Greece to separate church and state: a triumph for human rights", 8 nov. 2018) tradukita de Anna Lowenstein (Britio).



Irlandanoj forigis blasfemon de la konstitucio

Kvankam Irlando multe progresis en la lastaj jardekoj rilate al sekulariĝo, ĝia konstitucio (enleĝigita en 1937) ankoraŭ malpermesas la eldonadon aŭ elparoladon de io ajn "blasfema, subfosa aŭ maldeca". La konstitucio garantias liberecon de konscienco kaj de religia kredo kaj praktiko, sed laŭ ĝi: "La Ŝtato agnoskas, ke estas ŝuldata al la Ĉiopova Dio la omaĝo de publika adorato. Ĝi traktos Lian Nomon kun granda respekto, kaj respektos kaj honoros religion". Nekredebla aserto en konstitucio de moderna EU-ŝtato! Ĝis 1972 la konstitucio ankaŭ agnoskis la "specialan pozicion" de la katolika eklezio, sed feliĉe en referendumo 84% da irlandanoj voĉdonis por forigo de tiu paragrafo.

La 26an de oktobro ĉi-jare en nacia referendumo, Irlandanoj faris sekvan gravan paŝon cele al apartigo de ŝtato kaj religio. Ili voĉdonis per plimulto de preskaŭ 65% por forigi ĝuste tiun konstitucian paragrafon, kiu malpermesas kaj punebligas blasfemon. En ĉiu graflando plimulto voĉdonis jese.

La organizaĵoj Humanisma Asocio de Irlando kaj Ateisma Irlando estis aktivaj en la kampanjo ŝanĝi la konstitucion rilate al blasfemo. La prezidantino de la Humanisma Asocio Noeleen Hartigan diris, ke la rezulto estis "plia meljoŝtono por Irlando laŭ la vojo al pli moderna, sekulara, kompatema socio".

La referendumo rezulto signifas, ke la 37a amendo al la konstitucio, jam aprobita de ambaŭ ĉambroj de parlamento, estos leĝigita. Tamen restas ankoraŭ unu obstaklo: la kontraŭ-kalumnia leĝo (*Defamation Act 2009*), laŭ kiu, per preskaŭ la samaj vortoj kiel la ŝanĝota konstitucio, blasfemo estas krimo. Klare, necesas ankaŭ forigi la paragrafon pri la ŝtata omaĝo al la ĉiopova Dio antaŭ ol Irlando povos estis konsiderata sekulara lando.

Teksto preparita de la redakcio de Ateismo surbaze de informoj en la angla Vikipedio kaj la irlandaj ĵurnalo The Irish Sun.



Ĉirkaŭ la Mondo: Novaĵoj kaj Tendencoj

Jud-ortodoksa religia trudo en Israelo

Anna Lowenstein intervjuas israelan esperantiston s-ron Jehoŝua Tilleman. Jehoŝua estas ĉefdelegito de UEA en Israelo ekde 1982, vicprezidanto de Esperanto-Ligo en Israelo, membro de ATEO, SAT kaj IFEF, kaj aktivas dum jardekoj en movadoj kontraŭ ortodoksa trudo.

Anna: Ĉi-jare dum la kongreso ATEO diskutis la apartigon de ŝtato kaj eklezio. Ĉu vi povas priskribi por ni la situacion en Israelo?

Jehoŝua: Mallonge mi povas diri, ke tia apartigo neniam ekzistis, eĉ antaŭ la fondiĝo de la ŝtato Israelo. En la religia judismo ekzistas tri ĉefaj fluoj. Estas la ortodoksa judismo, kiu ekzistas en sia nuna formo ekde la 16a jarcento. En la 19a jarcento aperis en la teritorio de la nuna Germanio du aliaj fluoj: unue la reformisma kaj poste la konservema judismo. Ambaŭ signifis grandan modernigon rilate al la ĝistiamaj judismo, kiu jam tiam ne estis unueca. Precipe la reformisma (en Israelo: "progresiva") fluo ne plu akceptis blinde la ĝisnunajn doktrinojn, sed elektis novajn vojojn por observi la religion. Kontraste, la konservema (en Israelo: "tradiĉema") judismo opiniis, ke eblas akcepti la tradiciajn religiajn doktrinojn dum oni tamen partoprenas en la moderna socio. Tiu movado estas aparte forta en Usono.

El la klerisma judismo, kiu evoluis precipe en la 19a jarcento en Eŭropo,

venis la cionisma movado, kiu finfine kreis la ŝtaton Israelo. Ĝiaj gvidantoj kreskis en ortodoksaj familioj kaj ekribelis kontraŭ la ortodoksa judismo. Ili ne nepre farigis ateistoj, sed certe malobservis la religion en la praktika vivo.

Anna: Kial ili sentis la bezonon krei judan ŝtaton, se ili ne plu estis religiaj?

Jehoŝua: Kaj pro la daŭra anti-semitismo, kiu regis (kaj daŭre ekzistas) en Eŭropo, kaj pro la nacia signifo de la Malnova Testamento por la tutmonda judaro. Komence parto de la tiamaj cionistoj opiniis, ke la plej bona loko estus en aparta ŝtato en Usono, kie judoj povus vivi sen la ĉiamaj atakoj kontraŭ ili kiel popolo. Eĉ Teodoro Herzl [hercl], la fondinto de la cionisma movado, parolis komence pri Ugando. Zamenhof mem, kiu kunfondis cionisman studentan klubon en Varsovio, opiniis ke la plej taŭga loko por juda ŝtato estus en Usono. Li poste rezignis pri tiu ideo, sed tiam li jam estis tro okupata pro sia lingvoprojekto, kaj ne daŭrigis sian cionisman agadon, kvankam li daŭre

Ĉirkaŭ la Mondo: Novaĵoj kaj Tendencoj

restis fieraj judoj.

Anna: Vi diris, ke la fondintoj de Israelo estis plejparte sekularaj judoj. Kial okazis, ke ekde la komenco religiaj judoj tamen ludis rolon en la formado de la ŝtata politiko?

Jehoŝua: Jes, ili estis inter tiuj, kiuj enmigris Palestinon. Eĉ se ili ne estis parto de la cionisma movado, ankaŭ ili sentis la bezonon pro la cirkonstancoj en Eŭropo migri al Palestino. Kaj aliaj judoj jam loĝis en Palestino pli frue.

Tuj antaŭ la kreiĝo de Israelo, la estro de la juda komunumo Ben-Gurion [ben-gurjon], volis ke ĉiuj tendencoj de la juda loĝantaro estu reprezentataj en ĝia unua registaro, eĉ la *Haredoj* (ekstreme piaj ortodoksaj judoj). Reage al ties postuloj li sendis mallongan leteron al rabeno Levin, la estro de la ĥareda partio *Agudat Israel*, en kiu li prezentis kvar punktojn pri la rolo de la religio en la sendependa ŝtato. Tiu letero estas konata kiel *Status Quo* (antaŭe ekzistanta situacio).

La kvar punktoj estis: 1. oficiala observado de sabato, la ripoztago de la judoj; 2. la koŝereco, laŭ kiu ĉiuj ŝtataj kaj publikaj manĝejoj enhavu nur koŝerajn manĝojn; 3. la geedziĝoj kaj divorcoj (nur laŭ la ortodoksaj ritoj); 4. la edukado: ekzistos unueca ŝtata sistemo, tamen krome la diversaj fluoj de la ortodoksaj judoj rajtos reteni la proprajn edukistemojn. El tiuj kvar punktoj fontis poste la tuta problemoj de la religia trudo

en Israelo.

Anna: Kaj tamen en Hajfa la aŭtobusoj rajtas veturi sabate, kvankam ne en aliaj urboj.

Jehoŝua: En la regiono ĉirkaŭ Hajfa kaj ankaŭ en kelkaj aliaj lokoj, en kiuj la loĝantaro ne estis tute juda, en Nazareto ekzemple. En Hajfa estis ĉiam miksitaj loĝantaro, kaj tra tiu tuta regiono estas multaj araboj, do la situacio restas sama kiel antaŭ la fondiĝo de Israelo.

Rilate la publikan transporton: privataj buskompanioj ja rajtas funkcii sabate laŭ aparta mendo, kaj krome ekzistas ankaŭ navedaj taksioj, kiuj sekvas la itinerojn de la ĉefaj buslinioj. Ĉe ili la bileto ne kostas multe pli ol en la publika servo. Stiri sian propran aŭton ĉiu rajtas de ĉiam, sed la sekvo estas, ke por observi publike la sabaton laŭ la postuloj de la ortodoksaj partioj, en Israelo (spite al la oficialaj asertoj) oni emas evoluigi la privatan transporton koste de la publika, kaj la ŝoseoj pli kaj pli ŝtopiĝas.

Anna: Ĉu estas movoj en la israela socio por malpliigi la potencon de la religiaj partioj?

Jehoŝua: Jes, tiaj movadoj ekzistas ekde la ekesto de la ŝtato. Oni daŭre batalas por likvidi la rezultojn de la fifama Status Quo. Geedziĝoj kaj divorcoj ne eblas en Israelo ekster la religia komunumo. Laŭ leĝoj

Ĉirkaŭ la Mondo: Novaĵoj kaj Tendencoj

fontantaj ankoraŭ el la Otomana Imperio, ĉiuj judoj rajtas geedziĝi kaj divorci nur ĉe la ortodoksaj rabenoj; kaj same la aliaj minoritataj grupoj, kiel islamanoj, kristanoj kaj druzoj, devas geedziĝi kaj divorci kadre de sia propra religia komunumo.

Ekzistas tamen maniero por eviti ĉi tion: se judoj venas al Israelo jam geedziĝintaj, eĉ nur sekulare, kiel siatempe la plejmulto el la enmigrintoj el orienta Eŭropo, tiu geedziĝo estas rekonita postfakte de la ŝtato. Tiel la sekularaj kaj neortodoksaj judoj trovis dum la jaroj la manieron por eskapi la neceson de geedziĝo ĉe ortodoksaj rabenoj. Ili elveturas el Israelo, ekzemple al najbara lando kiel Kipro. Tie ili povas geedziĝi ĉe iu oficiala instanco, kaj revene al Israelo jam edziĝintaj, la ŝtato vole-nevole rekonas ilian novan statuson. Sed, se juda israela paro revenas al Israelo post eksterlanda divorco, la paro devas trairi ortodoksan ceremonion (sufiĉe strangan!) ĉe rabena tribunalo.

Anna: Kvankam la ortodoksuloj ne estas la plimulto, ŝajnas ke dum la tuta ekzisto de Israelo oni ne sukcesis per voĉdonado malpliigi ilian influon.

Jehoŝua: Ekde la fondiĝo de la ŝtato, ĉiam estis tiel. Eĉ kiam ekzistis malofte kaj sporade registaroj, kiuj enhavis eĉ ne unu ortodoksan partion, la regantaj partioj,

por certigi al si la regadon post la venontaj balotoj, ĉiam volis havi bonajn rilatojn kun la ortodoksaj partioj.

Anna: En kiu direkto iras la ĝenerala evoluo: ĉu la israela socio komencas esti pli aŭ malpli sekulara?

Jehoŝua: Ni diru ke la trudo, kiu estis siatempe kompleta, dum la jaroj malfortiĝas. La fama Status Quo estas daŭre malobservata precipe de la ne-ortodoksa loĝgruparo. En diversaj urboj ekestas privataj transport-sistemoj per busoj, funkciantaj dum la semajnfinoj. Tamen oni devas pagi membrokotizon al kooperativo por ebligi la ekziston de la transport-sistemo, eĉ se limigitan. Ekster multaj urboj ekzistas grandaj aĉetcentroj, kien venas la dumsemajnaj laborantoj, kompreneble per privataj aŭtoj, por aĉetumi sabate. En pluraj urboj kinejoj kaj restoracioj (nur nekoŝeraj!) restas malfermitaj semajnfine, kio ne okazis dum la 40 unuaj jaroj de la ŝtato. Pli kaj pli da sekularaj kaj nesekularaj judoj emas geedziĝi ekster la ortodoksa rabenaro. La divorco tamen estas pli komplika, ĉar la ŝtato insistas, ke almenaŭ la divorcoj estu farataj nur ĉe la ortodoksaj rabenoj por "certigi la unuecon de la popolo". Rilate la edukadon: la sendependaj eduksistemoj de la aŝkenazaj kaj sefardaj ĥaredoj daŭre prosperas, sed tiujn la sekulara kaj neortodoksa judaro penas nur adapti al la moderna vivo.

Ĉirkaŭ la Mondo: Novaĵoj kaj Tendencoj

Anna: Do laŭ via priskribo, la israela socio efektive moviĝas en la direkto de plia sekulariĝo.

Jehoŝua: Oni povus diri, ke la sekulara judaro en Israelo estas daŭre la plimulto, tamen kreskas la ortodoksa judaro. Ili ankoraŭ ne atingis la plimulton, sed laŭ

diversaj apokalipsaj prognozoj ili povus iam atingi tion. Bonŝance, pro la influo de la ĉirkaŭaĵo pluraj el la ĥaredoj transiras al la sekulara aŭ almenaŭ al la ortodoks-nacia judaro, kiu ŝajnas esti relative pli tolerema.



Progreso kaj malprogreso en Pollando: puno pro blasfemo kaj furora filmo kontraŭklerika

La 10an de oktobro 2018, regiona juĝejo en Varsovio ordonis al Jerzy Urban, posedanto kaj ĉefredaktoro de la kontraŭklerika semajna revuo *Nie* (Ne), pagi grandegan monpunon de 120 000 zlotoj plus 28 000 por juĝeaj elspezoj (kune ĉirkaŭ 34 000 eŭroj) pro eldonado en 2012 de “karikatura bildo de Jesuo kun neinteligenta vizaĝa mieno”. Tio estas la plej granda monpuno iam ajn aljuĝita en post-komunisma Pollando pro blasfemo – laŭ Artikolo 196 de la Krimleĝaro pri ofendado de religiaj sentoj. Laŭ tiu artikolo, “iu ajn, kiu ofendas la religiajn sentojn de aliaj per publika blasfemado kontraŭ objekto de religia adorado aŭ kontraŭ loko dediĉita al publika celebrado de religiaj ritoj alfrontas monpunon, limigon de libereco aŭ enkarcerigon ĝis du jaroj.”



La juĝo estas kondamninda pro kelkaj kialoj, kaj ĝeneralaj kaj specifaj, interalie pro la fakto ke la koncerna bildo estas sufiĉe varma kaj simpatia – tute ne ofenda. Jen ĝi, vi mem juĝu: En intervjuo, s-ro Urban klarigis, ke kvankam li estas malamiko de la eklezio kaj religio, ne estis lia intenco ofendi ies sentojn; kiel redaktoro de sia revuo, li simple akceptis la agrablan bildon por publikigo.

Indas klarigi, ke ekde 2014 neniu estis kondamnita pro blasfemo en Pollando. Ŝajnis, ke la situacio rilate al libereco de parolado kaj esprimado multe pliboniĝis dum la lastaj jaroj. Tamen, krom la fakto de la juĝisto en tiu ĉi kazo estas fervora dekstremulo, la kondamno devus esti rigardata kiel ankoraŭ unu simptomo de preskaŭ-faŝisma klerikisma revolucio, kiu okazas nuntempe en Pollando. Cetere, en

Ĉirkaŭ la Mondo: Novaĵoj kaj Tendencoj

la 80aj jaroj s-ro Urban estis kaj fama kaj fifama parolisto por la komunisma registaro, kaj multaj obseditaj kontraŭkomunistoj ankoraŭ vidas lin kiel la ĉefan malamikon, dum ili daŭrigas sian



Oficiala afiŝo de la pola filmo “Kler” (Klerikaro) inkvizicion kontraŭ veraj aŭ imagataj komunistoj preskaŭ 30 jaroj post la kolapso de la Pola Popola Respubliko.

Samtempe estas atentinde, ke dum nur

unu semajno, tri milionoj da poloj iris al kinejoj tra la tuta lando por rigardi la kontraŭklerikan filmon “Kler” (Klerikaro), kiu montras pastrojn kiel pedofilojn kaj monavarajn drinkemulojn. Estis nur kelkaj kazoj de malpermesado de la filmo fare de lokaj instancoj en siaj urboj. Tio ĉi estas la unua eksplicite kontraŭklerika plenlonga filmo en Pollando. Do, se ni konsideras ambaŭ okazaĵojn – la grandegan monpunon unuflanke kaj la homamasojn rigardantajn “Kler” aliflanke – ni vidas, ke la bildo ne estas klara. Mi opinias, ke ni frontas rapidan sekulariĝon kaj eĉ ateistiĝon je la sociaj kaj psikologiaj niveloj, sed pluan eklezian influon je la politika nivelo. Ni esperu, ke la klerikismaj preskaŭfaŝistoj, kiuj nuntempe regas en Pollando, ne sukcesos haltigi la progreson, kaj ke s-ro Urban havos pli da bonŝanco en apelacia juĝejo, ĉar la verdikto ne estas definitiva, kaj li intencas apelacii.

Andrzej Dominiczak (Pollando)
prezidanto de Pola Humanisma Asocio



Humanismaj judaj ceremonioj

Mi apartenas al la dua generacio de rus-juda familio, kiu enmigris en Usonon. Miaj geavoj, miaj gepatroj, miaj geonkloj ĉiuj estis maldekstremaj politikaj aktivuloj. Neniu en la familio okupiĝis pri religio, kaj neniu kredis je iu ajn dio.

Mia patra avo laboris kun Lenin dum la Rusa Revolucio en 1905; unu el miaj onkloj batalis en Hispanujo; mia patro estis aktivulo en sindikato, poste advokato; mia patrino organizis strikon en 1944; mia onklo, orkestra dirigento, estis forkon-

Ateisma Vivo

dukita de FBI rekte el la scenejo pro sia politika aktivado.

Ekzistas la diraĵo “En tranĉeo ne troviĝas ateistoj”, kio signifas, ke en situacio de vivdanĝero la homoj ja turnas sin al Dio. Sed mia patro batalis dum la Dua Mondmilito, kaj laŭ li tiu diraĵo estas absolute malĝusta. Fakte li havis la malan opinion: ke vidante militon kaj la terurajn aferojn, kiujn oni faras nome de patriotismo, la homoj ofte fariĝas ateistoj.

Samtempe tamen nia familio ĉiam estis tre konscia pri nia kultura heredaĵo. Ni celebris la judajn festojn kiel sekularajn/historiajn feriojn, same kiel ni festis Dankotagon kaj Kristnaskon kun niaj najbaroj. Dimanĉe mi iradis al politike maldekstra jidlingva lernejo, kie ni lernis pri la juda kulturo: pri la gravaj verkistoj, pri la juda historio, pri la sekulara signifo de la festotagoj, kaj ĝenerale kiel vivi kiel ateisma judo.

Mia avo kutimis diri, ke homo kiu ne helpas aliajn ne estas vera judo. Mi mem vivas kiel humanisto, kiel judo, kaj kiel ateisto. Por mi, tio ne estas kontraŭdiro, sed tute kohera maniero pasigi mian vivon.

Mia patro mortis kiam mi estis 12-jara, kaj la funebra ceremonio estis sekulara. Dum tiu ceremonio, pro la paroladoj memore al li mi lernis multajn aferojn pri mia patro. Mi estis mirigita, kaj mi neniam for-

gesis tiun sperton. Dum miaj adoleskaj jaroj mi bedaŭrinde devis ĉeesti plurajn funebrajn ceremoniojn de miaj samaĝuloj. La religiaj ceremonioj tute ne havis signifon por mi, kaj mi certis, ke ili ne havus signifon ankaŭ por la mortinto.

Dum miaj 20aj kaj 30aj jaroj, multaj el miaj nereligiaj geamikoj cedis al la familia premo kaj geedziĝis laŭ religia rito. Mi ĉiam pensis, ke ne estus plezuro geedziĝi per ceremonio, pri kiu oni mem ne kredas, aliflanke ankaŭ la ŝtataj sekularaj ceremonioj ne estas kontentigaj, ĉar ili estas tro mallongaj kaj sensukaj.

Mi neniam pensis, ke mi mem volos organizi ceremoniojn, sed kiam mi komencis studi pri humanisma judismo, mi komprenis, ke eblas tajlori ceremonion precize laŭ la propra elekto. La paro kreas la ceremonion kune kun la ceremoniisto, por ke ili havu precize tion, kion ili deziras, kaj nenion, kion ili ne volas. Tiumomente mi decidis, ke fariĝi ceremoniisto estus kiel fariĝi instruisto, kaj mi efektive jam estis instruisto.

Mi studis ĉe la Societo por Humanisma Judismo en Usono dum du jaroj, kun la sekvo ke en Usono mi estas “membro de la eklezio”, kio ankoraŭ multe amuzas min. Tio signifas, ke mi rajtas laŭleĝe subskribi geedziĝajn dokumentojn. En Britujo tamen tio ne estas permesata, do

Ateisma Vivo

se paro deziras mian helpon, ili devas unue jure geedziĝi ĉe ŝtata oficejo. Sed ofte ili opinias, ke la ceremonio, kiun ili plenumas kun mi, estas tiu “vera”.

Ĉis kiu grado tiuj geedziĝaj ceremonioj estas vere judaj? Tio dependas de la paro. La plejmulto el la paroj, kiujn mi geedzigas, deziras iujn kulturajn aspektojn de judismo en sia ceremonio: geedziĝi sub *hupa* (baldakeno), same kiel faris iliaj geavoj, ankaŭ ke la novedzo rompu glason sub sia piedo laŭ la juda tradicio, sed en aliaj detaloj ĝi estas sekulara geedziĝo kun individuaj trajtoj. Unu paro deziris panon kaj salon laŭ la pola tradicio, alia aranĝis, ke la tuta ceremonio estu samtempe tradukita en la ukrainan por la familio de la novedzino.

Tamen humanismaj-judaj ceremoniistoj ĉiam insistas, ke ni neniam uzu religian

lingvaĵon. Se la familio deziras preĝon, kiel la tradicia preĝo por la mortinto dum funebra ceremonio, tio povas estis farata de familiano sed ne de ni ceremoniistoj. Ni ankaŭ ne partoprenas en ceremonioj, kiuj validas nur por unu sekso, do ni ne faras cirkumcidojn. Anstataŭe ni faras nom-ceremonion por la novnaskito, kiu estas verkita de la gepatroj kune kun la ceremoniisto.

Por mi, la fakto ke mi povas verki kaj gvidi ceremoniojn, kiuj ligas la homojn kun ilia kulturo, permesas ankaŭ al mi ligiĝi kun mia kultura fono. Miaj geavoj, gepatroj, geonkloj, gekuzoj kaj ambaŭ fratoj estis kaj restas ĉiuj ateistoj: judaj ateistoj kiuj konas la propran kulturon kaj historion. Mi simple sekvas, kien ili gvidis.

Lajo Miller (Britio) ★

Humanisma gvidanto en britaj malsanulejoj

Lindsay van Dijk ĵus fariĝis la unua humanisto, kiu gvidos teamon de profesiaj kaj volontulaj prizorgantoj en britaj malsanulejoj. Kvankam 53% de la brita loĝantaro difinas sin nereligia laŭ esploro farita en 2017, ĝis nun la homoj, kiuj provizas patientojn per emocia kaj spirita subteno, kutime estas religiuloj.

Van Dijk estros teamon de tri kristanaj

pastroj kaj 24 volontuloj, inkluzive de katolika monaĥino, budhano kaj bahaano, ĉe filio de la brita sanservo en Buckinghamshire. Inter la salajrataj prizorgantoj estas du aliaj humanistoj, sed nun la unuan fojon nereligia gvidanto estros la grupon.

Ŝi raportis, ke la grupo bonvenigis ŝin, kaj ke ĝiaj membroj estas scivolaj pri

Ateisma Vivo

humanismo. En intervjuo ĉe la BBC, unu el ili diris, ke la tasko de la prizorgantoj ne estas prezenti difinitan religian vidpunkton, sed reagi al la pacientoj kaj al ties bezonoj, ĉu religiaj, ĉu nereligiaj. Tiel povas okazi, ke humanisma prizorganto devas doni emocian kaj spiritan subtenon al kristano, aŭ male (kaj verŝajne pli ofte), ke kristana prizorganto subtenas nekredanton. Sed ĉiam la celo estas helpi tiun individuon, ne insisti pri la propraj religiaj opinioj.

Laŭ pasintjara esploro farita de Humanistoj UK, estas vasta postulo inter la publiko je nereligia emocia kaj spirita subteno. Preskaŭ 7 homoj el 10 opiniis, ke nereligiaj prizorgantoj devus troviĝi apud tiuj religiaj en institutoj kiel malsanulejoj, malliberejoj kaj universitatoj. Ankaŭ la brita sanservo mem konstatis, ke tia subteno devus esti

disponebla por ĉiuj, sendepende de iliaj religiaj kredoj aŭ nekredoj.

Van Dijk esperas, ke estonte pli da humanistoj faros la trejnadon por subteni la pacientojn en malsanulejoj. Ŝi komentis, ke en Nederlando, jam de 50 jaroj nereligiuloj plenumas tiun rolon. Kaj efektive, por pli bone reprezenti la proporcion de nereliguloj en la ĝenerala loĝantaro de Britujo, la proporcio de nereligiaj subtenantoj devos draste altiĝi.

Verkita de la redakcio surbaze de informoj en
<https://humanism.org.uk/2017/08/21/nrpsn-kaj>
<https://www.bbc.com/news/av/health-45221945/the-first-humanist-lead-chaplain-in-the-nhs>



Nord-Irlando: humanismaj geedziĝoj

Kio estas humanisma geedziĝa ceremonio? Tio estas persone kreita ceremonio, kiu respegulas la kredojn de la koncerna paro. Ĝis lastatempe tiaj geedziĝoj ne estis jure rekonataj en Nord-Irlando. Kompreneble nenio malhelpis la paro mem aranĝi tian ceremonion, sed por ke la geedziĝo estu oficialigita necesis registri ĝin ankaŭ ĉe la loka registro-oficejo. Kontraste, ceremonio en preĝejo estis jure valida sen la neceso aparte registri ĝin.

La unua jure valida humanisma ceremonio okazis en junio 2017, sed tuj poste venis apelacio kontraŭ tiu rajto fare de pluraj gravaj ŝtataj instancoj: la ĉefjuristo John Larkin, la nordirlanda financa ministerio, kaj la Ĝenerala Registro-Oficejo. Tial post tiu unua

Ateisma Vivo

sukceso, humanisma ceremonio denove fariĝis privata elekto, ne oficiale valida, atendente la rezulton de la apelacio.

Nun finfine en aŭgusto 2018 tiu situacio ŝanĝiĝis per nova decido de la Apelacio-kortumo. Ĝi tamen malakceptis la apelacion, kaj reasertis la rajton de estontaj paroj oficiale geedziĝi per humanisma ceremonio.

Verkita surbaze de artikolo en la ĵurnalo Belfast Telegraph.

Anna Lowenstein (Britio) ★

ATEO-kunveno diskutis apartigon de ŝtatoj kaj religio

La publika kunveno de ATEO dum la lisbona UK, kiu okazis jaŭdon la 2an de aŭgusto, estis tre plena kaj de homoj kaj de enhavo. Ĉeestis sesdeko da homoj, el kiuj iom malpli ol duono estis membroj, dum la aliaj estis interesatoj. La temo estis “Apartigo de ŝtatoj kaj religio”. La kunvenon lerte gvidis Giridhar Rao el Barato en ne tre facilaj kondiĉoj, kaj estis kvar parolantoj: Christian Rivière el Francujo, Luis Ladeira el Portugalujo, Jehoŝua Tilleman el Israelo kaj Giri mem, kiu rapide skizis la situacion en Barato.

Christian enkondukis la temon per ĝeneralaj informoj pri la monda situacio. Luis klarigis al ni la historian situacion en Portugalujo kaj Jehoŝua priskribis la historion kaj la aktualan situacion en

Israelo (vidu artikolon de Luis kaj intervjuon kun Jehoŝua ĉi-numere).

Necesas atentigi, ke la jura situacio en iu lando, ekzemple la ekzisto de bela leĝo pri disigo de ŝtato kaj eklezio, nenion diras pri la surloka realeco. En Turkujo kaj Usono ekzemple estas teoria apartigo, sed en la praktiko, kiel ni ĉiuj legas ĉiutage en la gazetaro, religio pli kaj pli trudas sin en la publikan vivon.

Ni konsideru tiun mallongan kunvenon nur enkonduko al la temo, kaj daŭrigu la diskutadon en ĉi tiu kaj la venonta numero de nia revuo. .

Anna Lowenstein (Britio) ★

Ateismo

Organo de ATEO

Atcista Tutmonda Esperanto-Organizo

Vorto de la Redaktoro	2
Historiaj Perspektivoj	
Persekutado de la Valdanoj	3
Katolikoj kaj la itala politiko dum la pasinta jarcento kaj nun	6
Apartigo inter ŝtato kaj religio en Portugalio: historia resumo	7
Religiaj Demandoj	
Ĉu Dio apartenas al la genro <i>Homo</i> ?	9
La relevigo de Jesuo: dubinda miraklo	12
Ĉirkaŭ la Mondo: Novaj kaj Tendencoj	
Argentinanoj forlasas la eklezion, luktas por abortigo-raĵto	14
Kristana faŝismo venas al Brazilo: nova prezidanto promesas teokration	16
Triumfo por la homaj rajtoj en Grekujo	17
Irlandanoj forigis blasfemon de la konstitucio	18
Jud-ortodoksa religia trudo en Israelo	19
Progreso kaj malprogreso en Pollando: puno pro blasfemo kaj furora filmo	22
Atcisma Vivo	
Humanismaj judaj ceremonioj	23
Humanisma gvidanto en britaj malsanulejoj	25
Nord-Irlando: humanismaj geedziĝoj	26
ATEO-kunveno en Lisbono	27

Bonvolu sendi viajn artikolojn al la redaktoro: ateismo.bulteno@gmail.com

Por informo: Anna.lowenstein@esperanto.org

Prezidanto: (Vakas) — Vicprezidanto: Dominique Simeone, Francio
Sekretario: Anna Lowenstein, Britio — Kasisto: Dieter Rooke, Svislando
Redaktoro: Nyegosh Dube, Pollando — Enpaĝigas: Jakvo Schram, Belgio

Jarkotizo: 10€ por A-landoj, 8€ por B-landoj

Konto: ateo-y ĉe UEA